# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 07/03/2024 sescentsepdeksepa eldono (unua eldono 26/09/2011)**



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facîla elekti el al ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

PROTEINA TAVOLIZO IGAS PLASTAĴOJN DEGRADEBLAJ 23 DE MARTO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 2a de marto estis la unua sabato.

Venis Roger, Chris, John kaj Ian 02 9976 6320 *Roger Springer*

## El Adelajdo



La Jarkunveno de adelajdanoj okazis la 24-an de februaro kun partoprenantoj ĉeestaj kaj zoom-aj. Krom la kutimaj eroj ni aŭdis raportetojn pri la januara Somerkursaro, diskutis pri kiel varbi novajn interesiĝantoj pri Esperanto kaj aŭdis pri la radio-intervjuo de Sandor.

Amike *Katja Steele*





# Antaŭa Melburna Esperanto-domo

Laŭ mia iom supraĵa tralegado ĝis la noktomezo melburnaj esperantistoj posedis la propran E-domon, 10 The Crofts, Richmond ĝis proksimume 1988 kiam ĝi vendiĝis kontraŭ proksimume $250,000. https://www.realestate.com.au/property/10-the-crofts-richmond-vic-3121 )

Kiom proksimume kostus aĉeti la saman nemoveblaĵon en la nuno? Ĉu ĝi nun alproksimiĝas al unu kaj duono milionoj kaj en ĉiu monato eĉ pli altiĝas? Vidu AE573

# Pli ol 46 de miaj grandaj fiŝoj mortis pro manko de oksigeno

46 tiom grandaj vivantaj fiŝoj kostas eble $16,000. Mortaj ili kostas nenion.

## Ŝajnas ke iu elektra laboristo erare malŝaltis la aerajn pumpilojn

Kelkaj de la malgrandaj fiŝoj, malpli ol 20cm, ne mortis sed ĝis nun mi vidis nur ses vivantajn malgrandajn fiŝetojn.







Mi ne planas aĉeti aliajn fiŝetojn, ĉar mi estas tro maljuna por vidi ilin kreski. *Roger Springer*

**3ZZZ** En la elsendo de la 4a de marto 2024 troviĝas la historio de karnavalo kaj de la Virina Tago. Plie Orlando Raola klarigas kial nuklea energio estas la solvo al la energia krizo. La nova albumo de Jonny M “Jonny M petolas” gajigas la programon

*Franciska Toubale*

